Bratislava, 17/7/2016

Luko 10:38-42

Karaj gefratoj en Kristo,

La temo de nia kongreso estas esprimita per la du bibliaj demandoj : "Kiel vi legas ?" kaj "Ĉu vi komprenas kion vi legas ?"

La hodiaŭa teksto laŭ la legolisto komuna al multaj eklezioj rilatas ankaŭ al nia temo.

Jen rakoneto konata, kun roluloj ankaŭ konataj : Jesuo kaj la disĉiploj, la du fratinoj Marta kaj Maria. La evangelio laŭ Johano donas pliajn informojn, kiuj ne troviĝas en tiu evangelio : ili loĝas en Betanio kaj ili havas fraton Lazaro. Ĉu nia rakonto okazas en tiu vilaĝo ? Ĉu Lazaro ĉeestis ? Ni ne scias, kaj tio tute ne gravas.

Ni do serĉos kio estas la mesaĝo entenita en tiu perikopo, kion ni devas kompreni por ni hodiaŭ, per kio ni devas vivi.

La kerno de tiu teksto ne troviĝas en la kontrasto kontemplado / agado.
Sed ĝi troviĝas en la kontrasto inter du sintenoj : fido aŭ konfido kaj zorgo aŭ malkvieto.
Ambaŭ fratinoj konis Jesuon, eble eĉ apartenis al la disĉiplaro, certe helpis la grupon. Ĉifoje, ili akceptis ilin en sia hejmo. Sed en tio ili du havis malsamajn reagojn, sintenojn.

Tiuj reagoj estas kiam oni troviĝas antaŭ Jesuo. Ni detalu.
Maria sidas apud la piedoj de la Sinjoro kaj aŭskultas lian parolon : proksimeco kaj aŭskultado.
Marta staras, distrate de multe da servado, iras kaj venas, ne proksime de Jesuo, ĉar oni legas ke ŝi devas alproksimiĝi al li por alparoli lin. En ŝia kapo, Jesuo devus havi la saman zorgon kiun ŝi havas. Kaj kiun devus havi ankaŭ Maria. Pro tio ŝia demando.

Kion signifas la agemeco de Marta ? Kial ŝi maltrankvile estas distrata de multaj aferoj ? Ĉu ŝi pensas ke ĉio devas esti perfekta por la Sinjoro ? Kaj kiel estus tiu perfekteco ? Ĉu la servado postulas malkvieton, ĉu la zorgo devas tiel distri ? Ĉu ŝi ne vivas en la kunesto de Jesuo kun konfido, kun fido ? Ĉu ŝi forgesis la multobligon de la panoj ? Zorgo, malkvieto, streso, tio ne devus aparteni al la servado de la Sinjoro.

Kaj, ĉe Maria, ĉu estas neglekto ? Kiel ni priskribu ŝian sintenon ? La tuta trupo de la disĉiploj estas akceptata en ŝia domo, kaj ŝi sidas ĉe la piedoj de la Sinjoro. Ĉu ŝi vivas for de la realo ? Ĉu ŝi ne pravas tamen en tio ke la parolo de Jesuo estas la plej grava afero ? Kaj ĉu ŝi ne konsciis ke klopodado malhelpas aŭskultadon ? Ke la materiaj aferoj solviĝos per si mem. Ŝia fido, konfido al Jesuo forviŝis iun ajn zorgon.

En la antaŭaj perikopoj oni jam legis la rakonton pri la multobligo de panoj. Pli proksima estis la rakonto, la parabolo pri la Bona Samariano. Tuj poste sekvas la leciono pri preĝo kiu inkluzivas la Lukan version de la preĝo de la Sinjoro, "Patro Nia", kaj la klarigon al la slogano "Petu kaj al vi estos donite".

Ankaŭ tiuj montras la saman distingon en la sintenoj.

La unua reago de la disĉiploj en la ĉirkaŭo de Betsaida kiam vesperiĝis estis zorgo pri la homamaso kaj iliajn ripozejon kaj nutraĵon. Tiam Jesuo recentrigis ilian penson al li, ankaŭ al li kiel solvo. Jesuo resendis ilin al konfido, al fido anstataŭ distranta zorgo, kaj nutris la homamason.

Oni povus pensi ke la ĵusa rakonto pri la Bona Samariano diras inverse. Unuavide jes. Tiu kiu zorgis estas la Samariano. Sed la distingo troviĝas aliloke, ĉu obei la regulojn, ĉu doni helpon. Kaj kion signifas obei la regulojn se ne zorgi pri ili kaj pri si mem. Kaj kion signifas doni helpon se ne havi kompaton kaj fidon al la vivo, vivo kiu preteras la propran.

En la rakonto pri la petanta amiko, estas pluraj eblecoj pri kiu rolo estus mia. Oni kompreneble kaj valore povas troviĝi en tiu aŭ alia. Tamen la konkluda paragrafo instalas nin en la rolo de la petanto, de tiu sentaŭgulo kiu ĝenas per meznokta peto. Se tiu ne havus fidon, konfidon en sia amiko, li certe ne frapadus al la pordo, sed esplorus por solvo per siaj rimedoj.

Mi nun revenas al nia teksto. Kiel ni mem kondutu ?
Kio estas nia rilato al la Sinjoro ? Ĉu ni volas impresi lin per servado, agado, per obeo, klopodo, forgesante aŭskulti kion li diras ? Aŭ ĉu ni simple fidas lin kaj proksimas al li, sidas ĉe liaj piedoj, lasante al li la zorgojn ?
Ĉu li estigas en ni ripozon aŭ barakton, kvieton aŭ maltrankvilon, konfidon aŭ streson ?
Ĉu la kvieto permesas al ni aŭskulti kaj kompreni, aŭ ĉu niaj multaj zorgoj tiel distras nin ke la voĉo de la Sinjoro ne plu estas aŭdebla ?

Ni ĉiuj havas en la vivo zorgojn. Sed ĉu ĉiuj niaj zorgoj estas tiuj ankaŭ de Jesuo, de Dio ? Ĉu ni pensas kiel Marta ke certe Jesuo devas havi la samajn zorgojn kiel ni ? Kaj ke li devas komprenigi al la aliaj, ankaŭ al niaj kristanaj kunfratoj, ke tiuj niaj zorgoj estas ĝustaj, valoraj kaj validaj ? Sed, kiel por Marta, Jesuo havas aliajn zorgojn, kaj indikas klare al Marta ke ŝiaj zorgoj ne valoras, ke pensante pri diversaj aranĝaĵoj ŝi distriĝis de la vera valoro kiu venas de la parolo mem de la Sinjoro.

Zorge agadi por la Evangelio, por la Eklezio, tio povas malproksimigi nin de la Evangelio, de la Vorto de Dio, de la parolo de Jesuo, tio povas distri de la vera grava afero, de tiu unu bona parto kiun elektis Maria.

Mi ne scias kiel tio estas en la diversaj lingvoj, ĉu ekzistas esprimo kiel "agadismo", tiu emo sisteme, ĉefe kaj obstine serĉi agadon. Tiel agadis Marta. En niaj eklezioj estas multaj homoj kies celo estas agadi, kies zorgo estas agadi pli. Ili ne konscias ke tiu zorgo centrata ĉe la agado malproksimigas ilin de la plej grava parto, kiu estas la aŭskultado de la parolo de Kristo.

Tiel agadi kondukas al malapero de la vera celo, la Dia gloro. La agada zorgo per ĉiuj siaj detaloj distras tiun kiu tiel agadas de la vera celo. La agado mem fariĝas la celo anstataŭ la aŭskultado de la Evangelio, anstataŭ la atestado kaj la proklamo.

Tiu agadismo kondukas al kalkulo kun la propraj fortoj, kun la propra inteligento, kun la propra emo. Sed tiel oni forgesas kalkuli kun la forto de Dio, kun la saĝo de Dio. Tiel oni iom post iom malproksimiĝas de la Sinjoro. Sekve, kiam oni volas alparoli lin, oni devas reiri al Li, oni devas reakiri konfidon en Li, fidon en Li.

Tiu bona parto kiun elektis Maria ne estos forprenita de ŝi, neniam, ĉar en la nova mondo, en la nova tempo, tiu zorgo pri servado ne plu estos.

Kiel do estas nia kristana vivo ? Ĉu ni estas kiel Marta, ĉu ni deziras en ĉiuj detaloj zorge servadi kaj klopodadi, forgesante esti proksima al la Sinjoro, neglektante aŭskulti lian parolon, lian voĉon ?
Aŭ ĉu ni estas kiel Maria, kiu, fidante je tiu kiu multobligis la panon, sidas apud Li kaj aŭskultas lian parolon. Kaj tiu parolo estas tiu kiu en alia antaŭa perikopo sendis la disĉiplojn. Tiuj ne devis zorgi pri detaloj, nek monujo, nek saketo, nek ŝuojn. Nenio por forpreni la ĉefan parton, tiam la proklamon de la Evangelio de la Regno de Dio.

Tiun mision de la Eklezio, de ĉiuj kredantoj, oni devas plenumi per la fido kaj konfido, kaj ne per la zorgoj kaj klopodado kiuj distras el la kerno. Por la cetero, vi petu kaj estos donite al vi. Aŭskultu la parolon kaj preĝu.

Amen.